Heinrich Heine,

En nord' unu pino

tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof

En nord' unu pino en solo
Dormetas sur nuda altaĵo;
Glacia kaj neĝa tavolo
Ĝin kovras per tomba tolaĵo.

Ĝi sonĝas, ke palmo gracia,
En unu dezert' orienta,
Eterne pri lando alia
Malgaje sopiras silenta.

Traduko de la Germana poemo "Ein Fichtenbaum steht einsam" de HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF *(Ludoviko Lazaro Zamenhofo, ∗1859-12-15 – †1917-04-14).*

Arg-1023-2073 (2014-05-23 14:27:37)

Tiu ĉi Zamenhofa poem-traduko troviĝas en `http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php`.